# ESPERANTO ★ TRIUMFONTA ★

**Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizajoj.**

**Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco" kaj „Revuo" (literatura, popolscienca).**

**Protektantoj:**

*D-o Leono Zamenhof*, Warszawa
*W. M. Page*, advokato, Edinburgh
*Ernest Archdeacon*, Paris
*J. Gili Norta*, komercisto, Barcelona
*H. Fischer*, grandindustriisto, Bucureşti
*Frans Schoofs*, Antwerpen
*P. v. Medem*, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

**N-o 200**
**13. 7. 1924**

**Redakcio:**
Ĉefredaktoro: *Teo Jung.*
Redaktoro: *Robert Kreuz.*
Redakciaj kunlaborantoj:
*H. Jung* kaj *M. Butin*, L. K.

**Administracio:**
Horrem b. Köln, Germanlando

**Abonprezo**
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro aŭ 0,30 sv. fk. por landoj, kies valuto suferis maksimume 50%; por ĉiuj aliaj landoj 0,05 dol. aŭ 0.25 sv. fk.

**Anonceprezo**
po kvadrat-centimetro egalvaloro de 0.20 sv. fk. (ĉe antaŭa pago 0.15 sv. fk.), en „Internacia Komerco" la duoblo.

**Antwerpen, Barcelona, Bucureşti, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

# Esperanto en la Rumana Senato.
# La plej granda kunveno de negroj en la mondo.

## Nia 200-a numero.

La hodiaŭa numero estis destinita fariĝi dua speciala numero pri la

**XVI-a Universala Kongreso en Wien.**

Pro tio ni rezignis atentigi per speciala aranĝo pri la j u b i l e a karaktero de la numero.

Bedaŭrinde la promesita materialo ĝis la presado de tiu ĉi numero ne alvenis de Wien. Sekve, la numero 200 ne povas aperi en iu speciala aranĝo, sed nur kiel ordinara numero.

Tamen, per kelkaj vortoj ni volas atentigi pri la jubilea karaktero de la hodiaŭa numero.

Jam en nia 100-a numero ni rimarkigis, ke la legantoj akceptas ET jam kiel ion memkompreneblan. Hodiaŭ la regula aperado de ET fariĝis al la legantoj io ankoraŭ pli memkomprenebla. Tio estas signo de konfido sed ankaŭ de ioma indiferenteco. Jes, la plimulto de la legantoj de ET kontentiĝas regule ricevadi kaj legadi la jurnalon, sed ne plu aktive partoprenas je ĝia disvastigo. Kun bedaŭro ni konstatas ke, kompare kun nia statistiko en la 100-a numero, la nombro de la pagantaj abonantoj restis proksimume egala. Estas vere, ke la ĝenerala kvalito de la abonantoj ankoraŭ pliboniĝis; tamen oni rajtus kredi, ke en la daŭro de preskaŭ du jaroj la abonantaro povus kreski je minimume mil, se la legantoj montrus iom pli da aktiveco por sia „semajnulo".

Ni esperas, ke tiuj ĉi linioj efikos pliaktiviĝon de niaj legantoj, por ke en nia 300-a numero ni povu sciigi pli bonan rezultaton.

Antaŭen al la Tricenta!

*Teo Jung.*

## Parolado pri Esperanto en la Rumana Senato.

La rumana parlamento nun pritraktas la reformon de la instruado, kaj ni ĝoje sciiĝas, ke eminenta senatano s-o inĝ. Ernesto Balas (nacia malplimulto) bone uzis la okazon kaj la 7 junio dum la posttagmeza kunsido faris la jenan menciadon pri la internacia lingvo:

„En la ŝtatoj en Orienta Eŭropo estas tre grava afero la demando pri lingvo. La loĝantaro de la okcidentaj ŝtatoj plejparte bezonas nur la gepatran lingvon, kaj malgranda estas la parto, kiu krom la gepatra lernas unu aŭ du fremdajn lingvojn, por povi trairi la tutan mondon.

Ĉe ni, krom la gepatra lingvo oni devas lerni unu lingvon pli ol en la okcidentaj ŝtatoj. Krome, la hungaro, sakso, ruso, bulgaro, turko devas nepre ellerni la ŝtatan lingvon en sia propra intereso. Kaj se iu volus senpere interrilati kun ĉiuj nacioj de Rumanujo, tiu devus lerni ĉies lingvojn, do multe pli multajn ol okcidente. La lernado de multaj lingvoj bezonas multan tempon, dum kiu oni estas malhelpata en la studado de aliaj objektoj necesaj.

Sekve necesas fiksi kun multa zorgo, en kiu lernejo kaj per kiu lingvo oni instruu, kaj ebligi ĉiumaniere, ke tiun lingvon oni lernu tute kaj devige.

Ĉi-loke mi devas mencii la lingvon Esperanto, konsideratan kaj fervore instruatan en la okcidentaj kaj nordaj ŝtatoj, en Svislando, Italujo, Germanujo, Ĉeĥoslovakio, Finlando ktp., eĉ en Azio, Usono kaj Aŭstralio. Kaj je la fronto de la orient-eŭropaj ŝtatoj estas Bulgario, kie oni prave pensas, ke la malpli konataj balkanaj ŝtatoj povas tre facile havigi al si tutmondajn kunligojn pere de Esperanto.

La gravecon de la lingvo Esperanto rekonis ĉe ni s-o Romulus Voinescu, ĝenerala direktoro de la Polico kaj Ŝtata Sekureco, enkondukinte Esperanton kiel devigan objekton en la Policoficiran Lernejon. La graveco de tiu ĉi lingvo konstante pligrandiĝas en la mondkomerco, ĉe specimenfoiroj, ĉe la poŝto, radio-telefono ktp."

## Solena malfermo

**de „Zamenhofa Esperanto Societo" en la naskiĝurbo de la majstro Bialystok.**

**Salutparoladoj de la reprezentantoj de la registaro kaj urbestraro.**

La 8 junio n. j. en la salono de la urbestraro okazis la solena malfermo de „Zamenhofa Esperanto Societo en Bialystok". Ĉeestis ĉirkaŭ 100 personoj, inter kiuj dekkelkaj reprezentantoj de regnaj kaj publikaj oficejoj. La solenaĵo komenciĝis per jena parolado de la prezidanto de la Societo s-o J. Ŝapiro:

„La 2 junio 1887 aperis la unua lernolibro de la lingvo Esperanto kaj nur hodiaŭ, la 8 junio 1924, la okan jaron de la ekzistado de lingvo internacia Esperanto, mi havas la honoron malfermi en la naskurbo de ĝia kreinto la u n u a n Esperantan Societon. Dum la lingvo de Zamenhof laŭtaŭdiĝas jam de multaj jaroj en ĉiuj anguloj de la terglobo, prezentante al la homaro netakseblajn servojn, kiel ideala interkomprenigilo internacia, en Bialystok nur nun fondiĝis la unua Societo por propagando de tiu lingvo. Tio pruvas bedaŭrinde la verecon de malnova latina proverbo: „Nemo propheta in patria sua." — (Neniu estas profeto en sia patrolando.)

Por parte senkulpigi nian socion ni devas tamen konstati, ke tre grandan kulpon en la malsukceso de esperanta movado en Polujo havas la rusa cara registaro, kiu preskaŭ tute malkaŝe persekutis Esperanton kaj esperantistojn pro la kulturklerigaj celoj de nia movado.

Sed nun, kiam nenio malhelpas la disvastigon en Polujo de la helpa lingvo internacia Esperanto, Polujo, kaj antaŭ ĉio Bialystok, devas okupi ŝtatindan lokon en la esperanta movado. Ni estas certaj, ke bialystoka socio favore rilatos al la novfondita Societo kaj kun devizo: „Lingvo gepatra por internaj, lingvo internacia por internaciaj rilatoj", ni komencas nian laboron." —

Poste parolis la anstataŭanto de Bialystoka Vojevodo (guberniestro kaj senpera reprezentanto de la centra registaro) s-o departamentestro D-o Kikiewicz. Li salutis en la nomo de la vojevodo la Societon, kiu disvastigante la internacian helplingvon Esperanto helpas la fratecon de popoloj. En sia propra nomo li esprimis sian grandan estimon por la kreinto de Esperanto — geniulo Zamenhof, filo de Bialystok.

En la nomo de la urbestro de Bialystok parolis s-o A. Dryl, gratulante la Societon kaj dezirante al ĝi fruktoplenan laboron kaj pluan disvolviĝon de la internacia lingvo.

Poste s-o advokato J. Litaŭer el Warszawa faris unuhoran prelegon pri D-o Zamenhof, citante multfoje la de li en polan lingvon tradukitan „Vivon de Zamenhof" de Privat.

Loka gazetaro tre favore kaj detale raportis pri la solenaĵo. En la Societo nun funkcias kurso kun ok personoj sub gvido de s-o J. Ŝapiro, dua kurso estas en preparo.

Oni devas rimarki, ke Zamenhof Esp. S-to siatempe jam komencis sian agadon. Nun la Societo estas oficiale registrita kaj eĉ havas rajton malfermi siajn filiojn en la tuta Bialystoka Vojevodregiono (15 distriktoj).

## 5. Kongreso de Pola Esperantista Asocio

**Warszawa 6—8 septembro.**

La 6—8 septembro okazos en Warszawa la 5. Kongreso de Pola Esperantista Asocio.

Detaloj sekvos ankoraŭ.

* * *

**Internacia Kongreso de Universitataj Studentoj.**

La 4 septembro de la kuranta jaro komenciĝos en nia pola ĉefurbo Warszawa Internacia Kongreso de Universitataj Studentoj. Estus tre dezirinde, ke ĉiulandaj studentoj-esperantistoj multnombre partoprenu ĝin kaj jam nun postulu aranĝon de speciala Esperanto-kunveno dum la kongreso.

La kongreso estos bonega tereno por efika Esperanto-propagando, tial ĉiu, kiu nur povas, enskribiĝu tuj, menciu en la aliĝilo, ke li deziras partopreni fakan kunsidon de Esperanto kaj bonvolu sciigi ankaŭ nian Asocion „Pola Esperantista Asocio", adr. Warszawa, str. Krolewska 19, pri sia aliĝo.

Pri kondiĉoj de aliĝo al la kongreso informas la naciaj studentaj organizajoj.

## Promocio de eminenta protektanto de Esperanto.

Ĵus venis la sciigo el Turkujo, ke s-o direktoro Safvet Bej, varma amiko kaj protektanto de Esperanto, estas nomita ĝenerala inspektoro de l' Publiko Instruado. Transsendante al s-o Ĝenerala Inspektoro niajn sincerajn gratulojn, ni esprimas nian esperon, ke s-o Safvet Bej ankaŭ en la estonteco donos sian altvaloran apogon al Esp.

(Societoj aŭ unuopaj esp-istoj dezirantaj sendi apartan gratulan leteron, adresu al: s-o Safvet Bej, ĝenerala inspektoro de l' Publika Instruado, Grand' rue de Chichli, 225, Pera-Pankalti, Konstantinoplo, Turkujo.)

## La Deksesa.

**Al Wien!**

La esperantistoj en la tuta mondo jam preparas sin por la vojaĝo al la kongreso de Wien, kiu esperable fariĝos la plej granda demonstracio por Esperanto ĝis nun okazinta. La jam publikigita ampleksa programo almenaŭ antaŭvidas grandegan partoprenadon.

Kiel kutime ni ricevis diversajn alvokojn kun

**Invito**

al la diversaj urboj sur la vojo de l' kongreso. Pro manko de loko ni ne povas enpresi ilin. Ĉiuj ja ankaŭ ripetas la samon: Nia urbo estas la plej bela pro tiu kaj tiu motivoj. La sperto montris, ke nenio igas pli forta kaj pli impulsiga nian movadon ol persona konatiĝo. Ni do varme rekomendas al niaj amikoj: Sekvu la diversajn invitojn, se vi iel povos plenumi la dezirojn de la invitintoj! Vi estos ĉie kore akceptataj kaj antaŭ aŭ post la kongreso havos bonan distradon en rondo de agrabla samideanaro. Iru do survoje

**al Graz**

kie atendas vin afabla kaj gastama samideanaro. Sciigu vian alvenon al Esperanto Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6. Restadu en

**Salzburg**

se via vojo kondukas vin tra tiu ĉi urbo. Avizu

vian viziton al la prezidanto de Salzburga Esperanto Grupo, s-o R. Grössinger, Elisabethstr. 17.

Se vi venos el nordorientaj landoj kaj el Polujo, haltu nepre en

**Warszawa.**

Volonte akceptos vin Pola Esperantista Asocio, Królewska 19, Warszawa.

Alveturonte el okcidentaj landoj tra Svislando ne forgesu la samideanojn de

**Zürich**

kie parolemaj kaj gvidemaj samcelanoj estas je via dispono. Skribu pri via vizito al Esperanto Societo de Zürich, s-o Karl Jost, Culmannstr. 57, Zürich 6.

Ne laste, uzu vian vojon, se via tempo tion ebligas, por viziti aliajn samideanojn en survojaj urboj. La persona interkonatiĝo grave akcelas nian grandan kunlaboradon.

## Mezeŭropa trafikoficejo en Berlin.

(Mitteleuropäisches Reisebüro in Berlin.)

Sub tiu nomo ekzistas depost multaj jaroj trafika entrepreno, granda, atentinda kaj famekonata en tuta Eŭropo. Ĝi havas tre multe da filioj kaj suboficejoj en ĉiu eŭropa lando. La centro kaj ĉefoficejo troviĝas en Berlin W. 9, Potsdamer Bahnhof. Krom tio ekzistas en Berlin mem 20 suboficejoj.

La celo de tiu grava entrepreno estas ĝenerale: plifaciligo de ĉiu ajn trafika afero, de ĉiu ajn vojaĝo, ĉu per fervojo, ĉu per ŝipo, helpado kaj subtenado de ĉiu ajn vojaĝonto. Ĝi efektivigas tiun celon per prizorgo de bileto por fervojo aŭ ŝipo, per prizorgo de hoteloj, de sidlokoj, de pasportoj, de pakaĵekspedo, de pakaĵa asekuro ktp. Ĝi donas senkoste (nur kontraŭ respondkupono) ĉiun informon petitan pri vojaĝo. Estas tute egale, ĉu la hotelo estas en Germanujo aŭ en alia lando de Eŭropo, ĉu la pakaĵo estas ekspedata al Germanujo aŭ al alia lando en Eŭropo. Fervojajn biletojn (kajeretojn) ĝi alsendas laŭ mendo por vojaĝo de Italujo al Germanujo resp. tra Germanujo al iu lando norda, skandinava, aŭ de Britujo al Konstantinoplo ktp., resume de nordo al sudo, de okcidento al oriento de Eŭropo. Menciinda kaj memorinda ĉefafero estas, ke ĉiuj prezoj, ĉu pri hoteloj ĉu pri fervoj- resp. ŝipbiletoj estas originalaj, t. e. la mendinto ne estas devigata krompagi pli ol nur la sendkostojn de afranko. La „Mitteleuropäisches Reisebüro" (mallonge nomata MER) interrilatas kun ĉiu eŭropa ŝip- kaj fervojentrepreno, ĉu ŝtata ĉu privata.

Por fervojaj vojaĝoj ĝi vendas oficialajn kajeretojn valorantaj 60 tagojn depost la surstampita tago. Tiu kajereto entenas diversajn bileto-slipojn oficialajn por la tuta vojaĝo. Ĉiu vojaĝo estas kunmetata laŭ plaĉo de mendinto. La MER alsendas kajereton al la vojaĝonto unu semajnon antaŭ lia ekveturo, pli frue nur laŭ postulo. Malgraŭ sia famekonateco eŭropa la MER bedaŭrinde ne jam uzas Esperanton.

Gesamideanoj! Montru la vivantecon de nia lingvo al la dirita entrepreno per informpeto pri vojaĝoj intencataj de vi. Tio povos grave helpi al la enkonduko de Esperanto en tiu ĉi entrepreno. Precipe la venonta mondkongreso en Wien estos bona okazo por tio. Eksterlandaj gesamideanoj veturantaj al la XVI-a tra Germanujo kaj ankaŭ ĉiu alia samideano vojaĝonta skribu esperantan informpeton al tiu MER (adreson vidu supre) pri vojaĝkostoj kaj la plej bonaj resp. plej oportunaj fervojo-linioj de sia ekveturloko al la vojaĝcelo kaj promesu aĉeti la vojaĝkajereton per tiu MER. La gajno de tiu entrepreno por Esperanto alportus al nia movado grandan sukceson, ĉar post certa tempo troviĝus sur ĉiu kajereto (krom en germana, angla, franca kaj aliaj lingvoj) ankaŭ esperanta teksto. Bona, senkosta kaj multatentota propagandilo! Ankaŭ germanoj povas uzi kaj mendi tiun kajereton, se la tuta vojaĝo estas longa minimume 600 kilometrojn. Sekvu la peton kaj superŝutu la MER per informpetoj pri viaj vojaĝdeziroj.

*Max Blankenheim*, ĉefdelegito de UEA, teritorio Berlin.

## Favoraj rabatoj en Ĉeĥoslovakio.

Ĉeĥoslovaka ministerio por eksterlandaj aferoj disponigis je instigo de la komerca ministerio kaj peto de la Ĉs. Esperanta Instituto per decido de la 13. VI. 1924 n-o 93955/24—V/insp al la kongresanoj, traveturantaj Ĉeĥoslovakion al Wien, 50% rabaton je simpla traveturvizo, valora por restado en ĈSR kaj ankaŭ por reveno.

Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto Praha prez *Pitlik*.

## Interfoira Komisiono.

Pro kaŭzoj, pri kiuj mi raportos en Wien, — bedaŭrinde ne estos eble, okazigi oficialan konferencon de nia Interfoira Komisiono dum la kongrestagoj.

Mi urĝe invitas ĉiujn reprezentantojn de foiroj, partopreni la unuan fakkunsidon por komercistoj, por ke ni dum ĝi povu decidi pri aranĝo de neoficiala konferenco kaj pri la daŭrigo de nia laboro.

*D-o Dietterle*, prezidanto, Leipzig.

## Tabakkontraŭuloj.

Sekve de nia alvoko, aranĝi fakan kunvenon de tabakkontraŭuloj esperantaj dum tutmonda Esperanto-kongreso en Wien, jam alvenis multaj konsentoj el la plej diversaj landoj. Precizan daton (tago, horo, ejo) de tiu ĉi fakkunsido ni ankoraŭ ĝustatempe anoncos en „Esperanto Triumfonta". Intertempe pluaj proponoj, konsiloj, aliĝoj, sciigo de adresoj kaj ankaŭ monpagoj por elspezoj [ekzemple ni eldonos por la kongreso esperantlingvan flugfolieton] estas urĝe petataj.

Kelkaj samideanoj ankaŭ proponis fondon de „Esperantista Tabakkontraŭula Asocio" (ETKA), kiu fariĝus necesa ligilo de esperantlingvaj tabakkontraŭuloj. Tiu ĉi asocio havos duoblan celon: unuflanke ĝi utilos al la kontraŭtabaka movado per kunigo de samideanoj el la plej diversaj landoj kaj lingvoj kaj per reciproka sciigo de progresoj, konsiloj, ŝanĝo de proponoj ktp., aliflanke tiu ĉi asocio komunikos la tiel humanajn kaj noblajn celojn de kontraŭtabaka movado kaj la diversspecajn malutilojn de fumado al la esperantistaro jam ideale sentanta kaj pruvos la necesecon de mondhelplingvo Esperanto.

Kompreneble ETKA aliĝos la „Internationale Anti-Tabak-Liga" en Dresden, Köbnhavn kaj al UEA

Informojn pri tabakkontraŭula movado volonte donas kaj rilatajn flugfoliojn kaj literaturaĵojn diverslingvajn petas

Ligo de Aŭstriaj Tabakkontraŭuloj, grupo Wien. Wien I. Kleeblattgasse 7/II, Aŭstrujo.

*D-o Hloucha.*

## Ĉu propagandistoj?

Estas la rajto de ĉiu esperantisto havi krom Esperanto aliajn okupojn idealajn aŭ materialajn. Do, esperantisto povas esti ano, ekzemple, de pacifismo, vegetarismo, abstina movado, sava armeo, vestaĵreformo, nudkulturo ktp. Sed antaŭ la publiko ni devas zorgi, ke Esperanto ne estu identigata kun iu el tiuj aliaj movadoj. Esperantisto, kiu aperas antaŭ la publiko de la hodiaŭa civilizacio en stranga kostumo nekonforma al la

## Kristalbutona Mandarenaro.

Dum la lasta septembro interrenkontiĝis en Warszawa intelekta eminentularo da filozofoj, fiziologiistoj kaj psikologiistoj, kiuj, kvankam ili ne estis devenaj el la „Ĉiela Imperio", tamen imitis la mandarenan ruzeman formalismon. Kunveninte por ekzameni iajn fenomenojn, principojn kaj leĝojn apartenantajn al la okultaj sciencoj, tiuj ĉi majstroj pri metapsikismo havis la strangan ideon senvualigi sian animstaton per iu deklaracio jene tekstanta, kiu estis unuvoĉe balotakceptita:

„La dua Internacia Kongreso por la Psikaj Esploradoj protestas kontraŭ la konfuzo, kiun oni ĉiutage kaj ĉiulande faras inter la spiritismo kaj la psika scienco . . .

Denove asertas la pozitivan kaj eksperimentan karakteron de la psika scienco sendepende de ĉiu ajn morala aŭ religia doktrino."

Pri tio reĝustigo estas nepre necesa: la esplora studa spiritismo, kiun oni ne devas konfuzi kun tiu kvazaŭa „amuza fiziko", kiu utilas kiel distrilo kaj tempopasigilo dum la vintraj vesperoj, havas nek pastrojn, nek kulton, nek ritojn; ĝi do ne estas konglomerato da religiaĵoj, kiel ŝajnas alude duondiri la kongresanoj. Sed tute kontraŭe al la bruema protesto de la kongreso de Warszawa kaj malgraŭ la diroj kaj faroj de la protestintoj, psikismo, metapsikismo kaj spiritismo estos ĉiam, en la opinio de la publiko, kiu juĝas nur laŭ la faktoj, neapartigeble interligitaj dum la feliĉo same kiel dum la malfeliĉo. Ĉar ilia baza komenca punkto, ĉar iliaj esplorprocedoj, ĉar ilia celado estas tute samaj, ĉar ĉiuj tri pristudas ian homan konstantan principon kaj ties aperiĝojn, ĉu en ĝia estanteco, ĉu en ĝia pli malpli proksima estonteco, estas neeble, ke la popola komuna saĝo ne kunigu ĉiujn en la sama ideo pri kunfrateco. La sola afero, kiun la scivola ĉeestantaro klare distingas sur la senluma vojo de la okultismo, estas la malsimileco de procedo de la grupoj, kiuj laŭiras ĝin: la spiritistoj sendornigas la vojon, dum la psikistoj timeme postiras ilin, kalkulante la paŝojn. Se la rolo de pioniro postulas kuraĝon kaj persistecon, la spiritistoj certe malavare plenumis ĝin: antaŭ ĉiuj aliaj, ili pruvis per al eksperimento, sola fonto de vero, la ekziston de iu nemateria elemento en la materio, kiu per tio ĉi fariĝas pensokapabla estaĵo.

Antaŭ ĉiuj aliaj la spiritistoj eltrovis la ekziston de fluidaj fluoj, kiujn ricevas aŭ eligas la homa organismo; kaj rimarku, ke Branly, la famega eltrovinto de la senfadena telegrafio, fizikisto kaj kuracisto de la mensaj malsanoj, rigardas kiel similajn la nervajn kaj la elektrajn ondojn, tiamaniere antaŭanoncante la baldaŭan koniĝon pri la psikaj ondoj.

Antaŭ ĉiuj aliaj la spiritistoj konversaciis kun fantomoj, kiujn la metapsikistoj, ne povante nei ilin, provas kaŝi sub la nomo „ektoplasmoj".

Ankaŭ la spiritistoj estis la unuaj, kiuj malkonsentis, ke la cerba organo estus kreanto de penso; kaj oni vidis iujn viktimojn de la granda milito, kiuj, kun rompita kranio, kun kaĉigita cerbo, tamen nenion perdis el siaj movaj kaj sentaj kapabloj kaj reakiris, post kelkaj monatoj da malbona funkciado, la pensajn kaj rezonajn kapablojn. Ĉu oni devas miri tiuokaze, se la Bergsona filozofio malaltigas tiun ĉi organon ĝis la rango de nura revokilo de memoraĵoj kaj bildoj kolektitaj de niaj kvin sentorganoj, kaj se la pozitivista filozofo Auguste Comte iam eldiris la jenan konsterneganthan aforismon: „La vivantojn regas la mortintoj"?

Eĉ la teorioj de Einstein pri la relativeco, pesante sunan radion, plifortigis la spiritistan doktrinon pri la duonmateria fantomo, kvazaŭa miniatura nebulozo, plidensigita de la Spirito-Energio. Tiaj valoraj servoj certe meritis ian pli justan rekompencon ol la fieran kaj malŝateman akcepton de la Kongreso de Warszawa.

Ĉu ni devas kredi, ke la metapsikismo, tiu postnaskita frato de la spiritismo, ankoraŭ ne liberigis sin el la vulgaraj antaŭjuĝoj pri sorĉaĵoj kaj satanismo, kiujn oni zorge konservas en iuj nesciantantaj aŭ fanatikaj medioj kontraŭ ĉiu ajn fenomeno havanta spiritisman karakteron? Ĉu la metapsikistoj mem perdis la memoron pri la famaj kuracistoj de Molière kaj pri iliaj mokindaj diagnozoj? Se kelkaj adeptoj de la spiritismo devojiĝis en la trompartifikon kaj en la mistikismon, ankaŭ en la kuracista profesio troviĝas kelkaj ĉarlatanoj. Kion do signifas tiu ĉi solenega ekskomuniko de la septembraj kongresanoj? Ĉu oni ne povas deklari sin spiritisto, same kiel astronomo, aŭ ĥemiisto, ne estante senprokraste punata per ostracismo, kvankam en efektiveco ekzistas nur vorta malkonsento inter homoj, kiuj posedas egalan sciencan sincerecon kaj egalan eksperimentan sperton? La spiritistoj parolas pri fenomenoj de legado de pensoj, pri fenomenoj de klarvideco, de senkontakta movigo, de fantomaj aperoj; la metapsikistoj, timigite pro la ŝancelado de la malnova psikofilozofia konstruaĵo, kiun starigis penege iliaj antaŭuloj, nekuraĝante malkonfesi siajn heredajn, familiajn kaj profesiajn ligilojn, veraj mandarenoj, kiuj prenis sur sin la taskon defendi la estintecon, ŝanĝas la nomon de tiuj ĉi samaj fenomenoj kaj parolas pri telepatio, telekinezio, kriptestezio, ektoplasmoj. Sammaniere en Polujo tute egale, kiel en la Ĥina regno, oni kulturas la arton „savi la ŝajnon".

*J. Thiébault*, ano de la Psika Societo de Nancy.

* * *

## Antikveco de l' homa vivo.

En tiu ĉi gazeto mi legis antaŭ kelka tempo pri la trovo de homa kranio kaj laŭ Prof. Franz Boas de Kolumbia Universitato la trovitaĵo estas je 500 000 jaroj pli antikva ol la famekonata kranio siatempe trovita sur insulo Javo.

Mi volas rilati al la verko de W. Scott-Elliot: „The Lost Lemuria". En tiu libro la aŭtoro diris: „La Suda Maro estis iam granda kontinento kaj la multaj insuloj nun disigitaj estis frue la pli altaj suproj de la montoj sur tiu kontinento. La Hinda Oceano formis kontinenton, kiu disvastiĝis de la Sundaj Insuloj laŭlonge de la suda parto de Azio ĝis la suda bordo de Afriko." Patagonio estis parto de granda insulo okcidente de tiu kontinento, tiel kiel montras la karto geografia, aldonita al la nomita libro.

S-o Sclater, anglo, nomis la kontinenton Lemurio, rilate la simiosimilajn bestojn, kiuj loĝis en ĝi.

Haeckel opiniis, ke tiu estis la naskiĝejo de homraso. Tiu kontinento ŝajnis ekzisti de la frua permiaj tempoj (la supra parto de la paleozoa serio) ĝis la fino de la miocena epoko (Prof. Huxley), sed la disfalo de Lemurio okazis antaŭ la komenco de la eocena epoko. Ne estas eble konstati la aĝon de Lemurio, sed kiam ni komparas Lemurion kun Atlantis'o, ni povas akiri ioman imagon pri la aĝo de tiu kontinento. En la verko de sama aŭtoro: „The Story of Atlantis" ni trovas, ke la unua detruo de tiu ĉi kontinento okazis en miocena epoko antaŭ proksimume 800 000 jaroj.

Estis du okazintaĵoj en la historio de Atlantiso, kiam la glaciamaso dezertigis la nordajn regionojn. La unua okazis ĉirkaŭ 3 000 000 jaroj antaŭe

Haeckel asertis en sia verko: „The Pedigree of Man", ke la ekzisto de Lemurio en ia epoko de la tera historio estas vera fakto.

Se ni akceptas tion kaj rigardas tiun nombron da jaroj, pripensante, ke longtempe antaŭ la lemurianoj jam vivis homoj sur tero, tiam la aĝo de kranio de miliono da jaroj ne povas doni al ni materialon por diveni la aĝon de homaro, kiu estas bilionoj da jaroj.

Se ni ankaŭ akceptas, ke la suda parto de Sud-Ameriko apartenis al insulo en tempo de Lemurio, estas kompreneble, ke en Patagonio oni povas trovi restaĵojn de lemurianoj, kiuj ankaŭ troviĝas en Sud-Afriko, la suda Hindujo, Aŭstralio, aŭ en la nederlanda insularo.

Pli bone estos, diri ke la homa gento estas tiel aĝa kiel la tero, ĉar ni ne devas pensi, ke la homa korpo en tiuj fruaj periodoj de la tero estis konstruita el la sama materio kiel la posta. La lemurianoj apartenis al la tria radikraso de la homaro. Kian aĝon havas la unuaj homoj de la unua radikraso?

For-estas la ideo, akceptita de la scienco, ke la homo disvolviĝis el besto, ĉar tiutempe ne estis sufiĉe divolviĝinta besto sur tero. Paŝo post paso la scienco alproksimiĝos al la teozofia instruo, ke la homo ne evoluiĝis el besto sur tero.

*P. W. van den Broek*, Leiden (antaŭe en Grisee, Javo).

## Ĝemoj

eligitaj de kunlaborantoj kontraŭ la redaktoro, pro vane senditaj artikoloj al ET dum ĝia 200 numera periodo:

L a m a l k l e r a (kun gesto de malestimo): Jen oni vidas, ke li nek havas komprenemon, nek povas percepti la humoron kaj aristokratecon de miaj paroloj.

L a e n v i e m u l o (ĵus legante ET): Amasoda malsaĝaĵoj, sensencaĵoj, kiuj enhavas nenion kaj enuigas. Mi ne komprenas, kial oni enpaperujigis mian laboraĵon. Mi konfesas: mi ne estas granda genio, sed certe miaj verkitaĵoj estas pli bonaj ol la ĉi tie publikigitaj.

L a m a l f i d e m u l o (ekkaptita de dubo): Mi vetas mian kapon, ke tiu mallaborema redaktoro forĵetis mian artikolon, neleginte ĝin

L a k a l i g r a f o: Malgraŭ ĝi estis kaligrafita, oni ne enpresis mian artikolon.

L a g r u m b l e m u l o: Estas senutile, ne ekzistas sincereco. Ankaŭ li havas siajn amikojn, kiujn li favoras je la domaĝo de ĉiuj aliaj.

L a p r u d e n t u l o (bedaŭrinde ekzistas tro malmultaj): Pacienco! Mi klopodos proksiman fojon verki pli bone.

L a o p t i m i s t o: Ne ekzistas dubo! Mia artikolo ne atingis la redakcion. Verŝajne, malatenta mi skribis malĝustan adreson.

L a f i l o z o f o: Entute, kiu profitis, estas la poŝto, vendante unu poŝtmarkon pli.

L a b e z o n e m u l o (kaj ne ekzistas malmultaj): Mi bedaŭrindulo jam faris ŝuldojn je mia esperita honorario. (Ni admonas ne fari tion. — Red.)

*Joh. Bernhard*, München.

*Kolektu fundojn por radio-propagando.*
*Esperanto sole povas esti la radio-lingvo.*

kostumoj de la cetera publiko aŭ duone nuda, kaj kiu samtempe volas propagandi por Esperanto, certe ridindigas nian movadon.

Ekzemple, okaze de la XII-a Germ. Esp. Kongreso, dum la ekskurso al Bad Elster, oni vidis sinjoron en tia stranga kostumo. Li staris meze sur la placo antaŭ la kuracpalaco, svingante grandan verdan flagon. Certe li opiniis, ke per tio li faras efikan propagandon por Esperanto ĉe la bangastoj. Sed male. Kiel mi aŭdis de diversaj flankoj, tiu ĉi entuziasmulo sukcesis nur detimigi la interesulojn de nia serioza afero.

Mi ne intencas malpermesi al kiu ajn la portadon de sia speciala kostumo, tute ne Oni portu ĝin, kie oni volas, sed ne dum kongreso aŭ propaganda aranĝaĵo, per kiu ni volas gajni la publikon por nia afero.

Esperanto estas Esperanto, kaj laŭnatura kostumado estas alia afero. Propagandu vian laŭnaturan kostumadon ĉe esperantistoj, se vi volas, kaj propagandu Esperanton ĉe la naturhomoj, — sed ne provu propagandi dum esp. kongreso samtempe Esperanton kaj laŭnaturan kostumadon: per tio vi nur ridindigas — ĉe la homoj de hodiaŭa civilizacio — nian aferon.

*H. G.*

# Socia vivo.

## La plej granda negro-kunveno en la historio de l' mondo.

Sub tiu ĉi titolo raportas la gvidanta organo por la interesoj de la nigra raso, la 3-lingva gazeto „Negro World“ en New York pri granda kunveno de negroj, kiu okazos la 1 aŭgusto 1924 en la „Liberty Hall“ en New York. Ĝi celas decidi pri la sorto de preskaŭ 400 milionoj da negroj sur tuta terglobo. Ĉiuj samrasanoj estas invitataj partopreni al la fondo de „Politika Unio de Negroj por la Defendo de la Rasorajtoj“. Specialan intereson la unio dediĉos al la „nigra terparto“ kaj pledas por la reproprigo al la negroj. Por la komenco ĝi akcelas la koloniigadon de nure negraj ŝtatoj kiel **Liberio** kaj **Abisenio**.

La organizo de negroj sendas specialan ŝipon por koloniistoj al Liberio kaj starigis fundon por la propagandado de la negroceloj.

La ĝenerala alvoko enhavas la rimarkindan alvokon pri justa konsidero de la rajtoj de blankaj, flavaj, ruĝaj kaj kompreneble de nigraj homoj. Ĉar ĝi krome enhavas kelkajn aliajn tre larĝvidajn punktojn, ni represas ĝin tie ĉi.

### Skizo de programo por granda konklavo.

**Religio.**

1. Diskuto pri la diigo de Jesuo kiel ano de nigra raso.
2. Sanktigo de la Virgulino Maria kiel negrino.
3. Ideigo de Dio kiel Sankta Spirito sen materia formo.

**Politiko.**

1. Diskuto pri formado de Politika Negra Unio.
2. La edukado de negroj en komuneco, kie la negroj formas la plimulton de la loĝantaro, por atingi la respondecon pri memregado.
3. Traktado kun la blankaj nacioj kaj kun la Ligo de Nacioj por amika justigo de la nigra raso kaj por rearanĝo de la sistemoj sub kiuj negroj estas regataj.
4. Prezentado de peticio de 4 milionoj da amerikaj negroj la 6. 8. al Lia Ekscelenco la Prezidanto de Usono por konsidero de la deziroj paceme konstrui propran landon en hejmlanda Afriko.
5. Prezentado de simila peticio al la Senato kaj la Ĉambro de Deputitoj por la proksima kunsido.
6. Prezentado de simila peticio de 4 milionoj da okcidenthindaj negroj en la brita insularo al Lia Majesta moŝto Reĝo Georgo V., al la parlamento kaj la Ĉambro de Lordoj de Grand-Britujo.

**Industrio.**

1. Diskuto pri la disvolviĝo de Liberio, Abisenio kaj Haitio kiel sendependaj nacioj kaj aliaj landoj, kie negroj formas plimulton de la popolo, ekzemple Jamaiko, Barbado Brita Gujano, Brita Honduraso kaj aliaj insuloj de Okcidenta Hindujo kaj Afriko
2. Vojoj kaj rimedoj por konformigo de la rasoproblemo de l' sudŝtatoj de Usono, kontentiganta ĉiujn koncernatojn.
3. Vojoj kaj rimedoj por korekta edukado de la blanka opinio publika rilate al la bezonoj kaj deziroj de la negra raso.

**Socio.**

1. Diskuto pri la edukado de negra raso por la reala percepto de la socio, kaj starigo de principoj, kiuj gvidu tiujn kiuj deziras atingi socian malsamecon.
2. Kreo de atmosfero de pureco por la juna generacio de la raso por prepari ĝin por pli alta socia vivo.

**Komerco.**

1. Diskuto pri la akceptigo de ĉiuj negraj komunecoj en la komerco kaj en komercaj rilatoj
2. Starigo de interŝanĝaj komercentreprenoj.
3. Akcelado de l' trafiko de kaj inter ĉiuj negroj de komerca kaj industria profesioj.

**Edukado.**

1. Diskuto pri la formado de eduka leĝaro speciale por negroj.
2. Cenzurado de ĉiu literaturo enigita en la manojn de negroj.
3. Edukado de la raso al elektemo en la legado de literaturo enmanigita al ili.
4. Starigo de sendependaj negraj literaturo kaj kulturo.

**Propagando.**

1. Malpermeso de ĉiu fremda propagando kun la celo de l' detruo de la idealoj kaj la ensklavigo de la negra spirito.
2. La disvastigo de edukado super la raso por akcelado de ĝiaj propraj idealoj.

**Konstitucio.**

1. Propono de l' konstituciigo de Universala Negra Asocio por Pliperfektigado kiel necesa fondaĵo.
2. Diskuto pri la jara agado de tiu ĉi asocio.

**Humaneco.**

1. Diskuto pri la starigo de pli firma kamarada ligado inter la blanka kaj nigra rasoj de la mondo.
2. Diskuto senantaŭjuĝa pri la celoj kaj agadoj de Ku Klux Klan.
3. Diskuto pri la interrasaj problemoj de la blanka raso kaj ilia influo al la negro.
4. Diskuto pri la programo de blanka Kanado, blanka Ameriko, blanka Eŭropo kaj blanka Aŭstralio tiel, kiel anoncite de blankaj gazetoj.
5. Diskuto pri la sincereco de la Ligo de Nacioj kiel arbitracia institucio por la problemoj de la mondo.
6. Diskuto pri la franca polico kontraŭ la negroj.
7. „ „ „ angla „ „ „ „
8. „ „ „ amerika „ „ „ „
9. Diskuto pri la partopreno de negroj al la militraboj de 1914—18.
10. Diskuto pri la nova germana demando por redono de certaj kolonioj en Afriko, rabitaj de la indiĝenoj kaj forprenitaj al la germanoj dum la lasta milito.
11. Diskuto pri la honesteco de l' diplomatio en la rilatoj kun la landoj liberigitaj kaj la rajtoj de la malplimultoj.
12. Diskuto pri la forsendo de alvokoj al Lia Sankteco la Papo de Romo, al lia moŝto la Arkepiskopo de Canterbury kaj al la ĉefoj de la amerika eklezio, ĉiuj kristanaj gazetoj por honesta kaj homama pritraktado de l' problemo de humaneco, speciale tiom, kiom ili rilatas al la negroj
13. Alvoko al la reĝoj de Anglujo, Italujo, Hispanujo kaj Belgujo kaj iliaj parlamentoj por justa konsidero de negroj en Afriko kaj la kolonioj.
14. Alvoko al la parlamentoj de Anglujo, Francujo, Portugalujo ktp. por justa konsidero de negroj en Afriko, Ameriko kaj la kolonioj.
15. Diskuto pri la sintenado de negroj en venonta milito.
16. Diskuto pri la peticio de helpkrio de l' negraj popoloj de la mondo al la Ligo de Nacioj pri certaj mandatoj en Afriko ne jam aplikita de fremdaj popoloj al la negroj.

Nigraj samideanoj kaj interesatoj povas havigi al si detalojn pri la granda kunveno de High Commissioner General Office of Universal Negro Improvement Association, 54—65 West 133 th Street, New York City.

# Pacifismo.

Unu el la unuaj gvidantinoj de la pacifistoj-esperantistoj s-ino Isbrücker en Hago dissendas la sekvantan alvokon:

### Sepjara agado kontraŭ la milito!

Laŭ iniciato de anglo loĝanta en Genève sinjoro G. Spiller, nova energia movado komenciĝis kontraŭ la milito. Ĉar s-o Spiller ne estas esperantisto, kvankam ano de nia ideo (li invitis D-on Zamenhof al la Raso-Kongreso en London, kiun li organizis) li petis s-on D-on Privat kaj min klarigi, se eble transpreni lian planon por la esperantistoj. La projekto estas bonega, kaj ŝajnas al mi, ke la esperantistoj-pacifistoj plene povas aprobi ĝin:

En kelkaj angle redaktitaj folietoj li skribas jene:

„Vi scias, ke sen intensa laboro de la pacifistoj eksplodos dua mondmilito. Vi scias, ke la lasta milito ruinigis tiel multajn homajn vivojn kaj valoraĵojn kiel la antaŭlastaj **cent** militoj kune! Vi plie scias, ke nova mondmilito estos ankoraŭ multe pli ruiniga kaj detruos nian civilizacion dum jarcentoj. Fine vi scias, ke post dua mondmilito simple venos tria, kiu rekondukos la mondon al barbarismo.

**Kion fari?**

Ĉu ni devas resti senlaboremaj kaj devas malkuraĝe atendi la venontan katastrofon? Milfoje ne! La danĝera situacio postulas ĉiujn niajn fortojn.

Estas urĝe necese, ke ni kunigu ĉiujn laborantojn, ke ni batalas en unu forta ligo. Sepjara energia agado de koncentrigitaj fortoj multe pli efikos ol longdaŭra laboro de memstaraj individuoj aŭ unuiĝoj jen en unu lando, jen en alia.

Homoj de kiuj ajn partioj aŭ klasoj, vi ĉiuj estas minacataj!

### Nur tutmonda, komuna agado povas forigi la danĝeron.

S-o Spiller plie montras la metodon, laŭ kiu ni povas atingi la celon. Li atendas multe de ŝanĝita, plibonigita Ligo de Nacioj. Li volas veki la publikan opinion, tiamaniere, ke ankaŭ la parlamentoj kunlaboros por konservi pacon kaj fari justecon.

En la julia numero de „Esperanto“ mi jam verkis artikolon pri la sama agado. Legu ankaŭ ĝin, pensu pri ĝi, tiel ke ni povos priparoli ĉion en nia Wien'a kunveno. Ni ne plu laboru dise kaj sencele, ni unuiĝu por efika laboro! Ni ŝuldas tion al la junularo, al kiu ni alie lasos ruinigitan mondon.

*Julia Isbrücker*, s'Gravenhage.

## Geografio.

### La popolo de Madagaskaro.

Nur tre malmultaj eŭropanoj scias detalojn pri madagaskara loĝantaro. En tiu ĉi franca kolonio loĝas nur 15000 blankhaŭtuloj. Entute la loĝantaro ĉirkaŭas 3,5 milionojn da homoj. Nia popolo estas nomata: malgaŝoj. Ĝi konsistas el indiĝenoj, negridaj sakalavoj kaj el negroj intermiksitaj kun hovaoj de malaja deveno. La malgaŝoj ĝenerale estas kristanoj. Inteligentuloj estas okupitaj en koloni-entreprenoj, lernejoj, preĝejoj, administracioj ktp. Ankaŭ Esperanto disvastiĝas iom post iom inter miaj samrasanoj.

*John Razafimahozo*, Tatave.

## Historio.

### La centjaro de la gasa lumo en Paris.

La 28 septembro 1799 franco Philippe Lebon ricevis patenton pri gasa lumo, nomata tiam „termolampo“. Tiam la gasa lumo estis eligata el ligno, sed la eltrovinto jam precizigis en sia patento ke ĝi povas esti ekstraktota el karbo. Ĉu Lebon estis la unua eltrovinto de la gaso estas malfacile diri: anglo Murdoch kaj belgo Minckelers samtempe laboris kaj kreis gaslumon. En domo en strato Saint-Dominique-Saint Germain, li faris la demonstradon de la gaslumo al mirigita Paris-a publiko. Oni parolis pri miraklo kaj la konsulo Napoleono interesiĝis pri la eltrovo de Lebon, ne tiel pro la gaslumo, sed por diversaj ĝiaj sub-materioj kiujn li bezonis por la armeo. La 2 decembro 1804, la tagon mem de la kroniĝo de Napoleono, oni trovis sur „l' avenue des Champs-Elyseés“, tiam ankoraŭ danĝera loko, la kadavron de Lebon kun 13 ponardaj vundoj. La mistero neniam estas klarigita.

En 1811, la vidvino de Lebon ricevis de la Imperiestro pension, sed la laŭleĝa daŭro de l' patento ĉesis en 1814. Frederic. Albert Winsor, anglo de germana deveno, jam instalinte gaslumon en la Londona City, venis al Paris, kaj en januaro 1817, por la unua fojo, la magazenoj de „Passage des Panoramas“ ekbrilis de gasa lumo En 1818 la unua kompanio de gaslumo estis starigata kaj kvin aliaj fondiĝis. Nur en 1860 okazis alcentrigo de la gaslumo en la ĉefurbo kaj la kunfandiĝo de diversaj kompanioj. En la Opera teatro la unuan fojon gaslumo aperis la 6 februaro 1822, kiam oni ludis (miriga hazardo) unuafoje „La mirindan lampon“. La lustro havis 108 bruligilojn kaj eligis grandan varmecon. Kiel ĉiu novaĵo, ĝi elvokis protestojn kaj malaprobojn: la verkisto Charles Nodier anoncas la estontan morton de urboj kaj la sufokigon de homoj, teatraj fervoruloj kontraŭbatalas kaj, finfine, la Scienca Akademio, trankviligas la rutinulojn, certigante ke la gaslumo ne estas danĝera. Tamen la batalo daŭras kaj kelkajn gassocietoj estas pagkapablaj.

La 20 aŭgusto 1824 aperas la unua reĝa ordono pri la gasindustrio. Antaŭ cent jaroj estis en Paris nur 69 gaslanternoj anstataŭ 12 672 nun. En la nokto de 31 decembro 1829 al 1 januaro 1830 estis inaŭgurita la gaslumo de la strato „rue de la Paix“, kie troviĝas ĉefaj modlaborejoj de Paris.

(Laŭ artikolo de G. M. en „Le Temps“.)

*L. A.*, Paris.

## Literaturo.

### Fama biblioteko transmigris al Jerusalem.

La Londona Komitato por la Hebrea Universitato en Jerusalem akiris la grandan orientan bibliotekon de la mortinta budapesta profesoro Ignaz Goldziher kaj en la lastaj tagoj februaraj la biblioteko estas ekspedita trans Trieste al Palestino. Post kelkmonata intertraktado la hungara registaro permesis la elmigron de la biblioteko, kiu estas en sia fako unu el la plej famaj. Ĝi estas plej granda privata libraro tiuspeca, konsistante el 6000 verkoj priskribantaj en diversaj (ĉefe orientaj) lingvoj ĉiujn fakojn de la semida scienco. Ĝi enhavas plurajn arabajn, persajn kaj turkajn librojn, da kiuj estis en Eŭropo unusola ekzemplero. El la lasta jarcento ĉiuj konataj aperintaĵoj enestas. Speciala fako estas dediĉita al la moderna araba kaj hebrea sciencoj. Grandan valoron havas multaj marĝenaj rimarkoj de la mortinta profesoro. — La biblioteko estas destinita por la fondota Hebrea Universitato en Jerusalem, kiu fariĝos tutmonda centro de hebrea scienco. Ankaŭ la araba sciencularo palestina trovos en la kolekto valoran helpon en sia laboro.

*L. J.*, London.

## Mineralogio.

### La ortrovejoj de Tibeto.

Depost la plej antikvaj tempoj Tibeto estas unu el la landoj eksportantaj oron. La tibetano interŝanĝe ricevas por sia oro arĝenton kaj aliajn produktaĵojn. La plej gravaj ortrovejoj de Tibeto kuŝas en la norda dezerto kaj en la regiono inter la tibeta ĉefurbo Lhasa kaj la ĥina limo. Angla vojaĝanto antaŭ nelonge tramigrante Tibeton faris multajn observojn, pri kiuj raportas Rudolf Hundt en „Leipziger Illustrierte Zeitung“. La tibeta orserĉisto kolektas la orpolvon. Li kredas, ke li forprenante orbulojn ĉesigos la orpolvon, ĉar la orbuloj laŭ la popolopinio produktas la orpolvon. Kiom forta estas ĉi tiu superstiĉo en Tibeto pruvas la jena okazintaĵo. La tibeta estraro antaŭ kelkaj jaroj sendis junulon al Anglujo, por ke li tie instruiĝu en la mina scienco kaj la metalurgio. Post sia reveno la inĝeniero studis la orriĉaĵojn de la lando, konstatis en diversaj regionoj grandegajn oramasojn kaj komencis eligi oron el minaĵo ĝin enhavanta. Sed apenaŭ li estis komencinta sian laboron, jen la lamaoj de la apudaj lokoj ekaperis en la laborejo, malpermesis la daŭrigon de la laboro kaj ordonis, ke la tuta oro produktita estu tuj reportata al la loko, kie ĝi antaŭe estis. La inĝeniero sin turnis al la estraro kaj petegis, ke oni ebligu al li la labordaŭrigon, ĉar tiamaniere

